EV - Ostende - 1934 - 5a kong

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

5ª

KONGRESO DE ESPERANTO

JUBILEA FESTO

OSTENDE

19-20-21 MAJO 1934

PROGRAMO



K O N S I L O

al la

K O N G R E S A N O J

Atentu pri la horo de komenco de la diversaj aranĝoj !

Venu tre akurate je la fiksitaj horoj !

SABATO

19 MAJO - 1934

A K C E P T E J O :

Kafejo "La Leono", Kapelostrato, n° 90 (plano n°1)

==========

19½a Komuna foriro el la akceptejo al la Granda Placo, kie okazos, je la

20a Sonorilarkoncerto (plano n°2)

Programo :

1. Frata Marŝo..... A. Dauphin
2. Beiaardlied..... P. Benoit
3. Al la Fratoj..... L. Zamenhof
4. De Schelde..... K. Mistdagh
5. Vi estis..... S. Laks
6. Flirto de l'Marionetoj..... J. Ensor
7. La Farmistedzino..... W. Maynard
8. Samideana Trinkkanto..... F. Swagers
9. Facilanimaj estas virinoj..... W. B.
10. Kiu jen aùdigas sin..... A. N.
11. Kongresanino..... A. Booy
12. Himno pri Universala Paco..... Vincent F. Bort
13. Beiaardmarsch..... H. M.
14. Leono estas Best..... W. Appleby
15. La Espero..... Z. Zamenhof.

21a Malfermo de la Kongreso - Interkonatiĝa kaj kabaredvespero, kun helpo de la dancorĥestro "La Samideanaj Boys", sekcio de la Esperantista Grupo Kortrijk, en la ejo "Ok Horoj-Domo, Louisastrato, n°25. (pl.n°4)

Samtempe okazos la inaùguracio de la flago de la grupo Ostendo.

En aparta salono okazos kunveno de Flandra Ligo Esperantista. Ĉiu samideano povas partopreni la diskutadon; voĉdoni rajtas nur la delegitoj.

La kabaredvespero daùros ĝis la 24a30 horo.

RESTORACIO REKOMENDITA
por via sabata aù dimanĉa vespermanĝo
H O T E L O A T L A N T A
Granda Placo , n°14 (pl.n°8)

Neniu povas forlasi la kongreson se li ne aĉetis la
KONGRESA-n KANTARO-n
Prezo: 3 fr.

DIMANĈE
20^AN DE MAJO

10ª= En la Kapelo trovîganta en la St. Sebastiaanstrato, (apud la Granda Placo) - (pl. n°I2) Diservo kun Esperanta prediko de Lia Moŝto Pastro J De Coene, prezidanto de Belglanda Katolika Ligo Esperantista.
La kongresanoj kunvenas sur la Granda Placo.

11ª Post la Diservo, sekvantara iro ĝis la urbodomo, kie okazos oficiala akeepto de la kongresanoj.

N.B.- Ni insiste alvokas por modele enorda sekvantaro. Ostendo vidas regule ĉiuspecajn manifestaciojn, kaj necesas ke la nia favore impresu la publikon.
Post la oficiala akcepto, okazos en la urbodomo jubilea kunsido de Flandra Ligo Esperantista kaj de Flandra Esperanto-Instituto.

12 ½ Post la akcepto kaj la kunsidoj en la urbodomo, florkrono estos metata ĉe la monumento al la militviktimoj.
Ĉiuj kongresanoj ĉeestu !

13ª= Bankedo en ejo "Ons Huis" (Nia Domo) - (pl. n°3) Jozef II strato.
La partoprenantoj al la bankedo devas forlasi la salonon akurate je la I6ª, por veni ĝustatempe al la loko por la fotografado.

16 ½ Komuna fotografado sur la ŝtuparo de la nova banpalaco. La bildo kutime aperas ankaù en diversaj gazetoj kaj tial necesas ke absolute neniu forrestu por prezenti imponan amason. Do, ne manku ! (plano n°7).

18ª= En ejo "Nia Domo", Jozef II strato, (pl.n°3) Esperantista festo.

P r o g r a m o :

1ª parto

- fortepiano
- akordeon-ludo
- kanto
- fortepiano
- akordeon-ludo
- fortepiano
- kanto.
- disdono de diplomoj al la laùreatoj de la ekzamenoj de Flandra Esperanto-Instituto

I n t e r a k t o

2ª parto

LENJO el la ĈIELREGNO
Tradukita de R. De Bondt
Prezentota de la grupo "Pioniro" el Aalst.

G e a k t o r o j :

Aspazio	65 jara	F-ino Ivonne Verschooris
Aùgusto	60 jara	Robert De Bondt
Desire	70 jara	Leo Calloens
Tuurke	20 jara	Firmin Stroobants
Lenjo	20 jara	F-ino Maria Van Mulders
Febronie	40 jara	F-ino Elza Geeroms

Post la teatraĵo jam estos haveblaj fotografaĵoj. Ili kostas po 3 frankoj. Samideanoj kiuj forveturas pli frue, povas mendi ilin dum la interakto.

21ª= Granda Balo, kun unu el la plej famaj dancorĥestroj el la urbo, en ejo "Nia Domo" (Pl.nº3).
La balo daùros ĝis la 26ª.

LUNDE
21ª DE MAJO

9ª= En la salono de Hotelo Atlanta, Granda Placo, I4, (pl.8) jamkunveno de la Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj FUKE, sekcio de I.KU.E.

10ª= Vizito al la ĉefpreĝejo kaj antikva preĝejturo.
Oni kunvenas sur la Granda Placo, je la 9 I/2.

11ª= Vizito al la nova banpalaco kaj al la kursalo, fiŝist-haveno kaj fiŝvendejo.

13ª= Komuna tagmanĝo en "Ok Horoj-Domo", Louisastrato (pl.4)

14½ Promenadeto sur la palisaro. Ĉeesto de la forveturo de la ppŝtŝipo kun niaj anglaĵ samideanoj al Dover.

15½ Ekskurso en plena maro dum unu horo. Foriro de la palisaro Libervola partopreno. Prezo 3 I/2 fr.

Koncentrigo de la kongresanoj ĉe la marbordo, proksime de la palisaro, kie okazos sabloludoj, konkursoj, kantado, k.t.p.

=== Adiaùado en la akceptejo ===

Gesamideanoj! La Ostendaj geesperantistoj klopodis oferi agrablan restadon en la urbo "La Reĝino de l'marbanejoj". Ili esperas ke la libertempo pasis tre amuze kaj interesplene. Ili deziras al vi bonan vojaĝon kaj ĝis revido dum la venonta Flandra Kongreso !

==========

GIS REVIDO !

Adiaùante.... ne ploru kaj ne ĝemu !
sed diru:

ĝis la 6ª en Bruselo
Pentekosto
I935

—

AĈETU ESPERANTE !

Krajono "Esperanto" bonega kvalito	1 fr.
Leterpapero kaj kovertoj, po 20	3 fr.
Kongresa kantaro	3 fr.

① Akceptejo
2 Granda Placo
③ Ejo "ONS HUIS"
④ Ejo "8 uren Huis"
⑤ Kursalo
⑥ Urbodomo
⑦ Banpalaco
⑧ Restoracio ATLANTA
⑨ Hotelo METROPOLE
⑩ Gostoficejo
⑪ Horhorlogo
12 Diserso.

OOSTENDE
5ª Flandra
Kongreso de Esperanto
1934